# LA AKUPUNKTURO KAJ KAŬTERIZO DE ĈINIO

ESPLORA INSTITUTO DE AKUPUNKTURO KAJ KAŬTERIZO DE LA AKADEMIO DE TRADICIA ĈINA MEDICINO

ĈINA ESPERANTO-LIGO, PEKINO

# LA AKUPUNKTURO KAJ KAŬTERIZO DE ĈINIO

**Esplora Instituto de Akupunkturo kaj Kaŭtrizo de la Akademio de Tradicia Ĉina Medicino**

ĈINA ESPERANTO-LIGO
PEKINO, 1964

## *NOTO DE LA ELDONINTO*

*Akupunkturo kaj kaŭterizo estas du el la terapiaj metodoj uzataj en Ĉinio jam kelk mil jarojn. Post la Liberiĝo, medicinaj laborantoj en diversaj lokoj de Ĉinio faris intensan esploradon en tiu ĉi fako de la ĉina medicino, kaj ĝin uzas por kuraci multajn kompleksajn malsanojn. Ĝia efikeco estas bone konata al la popoloj de multaj landoj en la mondo. Por kontentigi niajn eksterlandajn amikojn, kiuj, ĉiam pli multiĝantaj deziras sciiĝi pri tiu ĉi fako de la tradicia ĉina medicino, ni kompilis tiun ĉi libreton.*

*Tiu ĉi libreto konsistas el la jenaj kvin partoj:*

1. *Kio estas akupunkturo kaj kaŭterizo?*
2. *Iom pri la historio de akupunkturo kaj kaŭterizo.*
3. *Kuracado per akupunkturo kaj kaŭterizo.*
4. *La efikeco de akupunkturo kaj kaŭterizo.*
5. *Klarigo pri la terapio de akupunkturo kaj kaŭterizo.*

## 1. KIO ESTAS AKUPUNTURO KAJ KAŬTERIZO?

Akupunkturo kaj kaŭterizo estas du ĉinaj kuracmetodoj hereditaj tra multaj jarmiloj; ili estas parto de la ĉina medicina heredaĵo. Kvankam diferencaj en karaktero, ili estas ofte uzataj samtempe, tial ili estas kutime menciataj kunkune.

Por akupunkturo, estas uzataj malgrandaj metalaj pingloj, faritaj nun ordinare el nerustiĝo-ŝtala fadeno; por kaŭterizo, estas uzataj bastonoj aŭ rulaĵoj el seka artemizio. Ili aplikiĝas al certaj punktoj sur la homa korpo, laŭ la teorio de la tradicia ĉina medicino, kaj diagnozo de la malsano kiun la paciento suferas. La pingloj estas uzataj por enpiki la homan korpon; la artemiziaĵo brulas de la supro malsupren, iom aŭ eĉ forte varmigante la haŭton. Tiamaniere, la procesoj de metabolo kaj cirkulado estas stimulataj, kaj sekve la malsanoj kuraciĝas.

## 2. IOM PRI LA HISTORIO DE AKUPUNKTURO KAJ KAŬTERIZO

En la klasika verko *Libro de Interna Medicino* (*Nej Ging*), atribuita al legenda imperiestro Huangdi kaj heredita de antaŭ pli ol du mil jaroj, estas menciita ŝtonpikilo. Ĉar Huangdi regadis antaŭ pli ol kvar mil jaroj, ni povas dedukti el tiu ĉi libro, ke akupunkturo estis efektive praktikita en tiu tempo. La *Libro de Interna Medi-*

*cino* efektive resumis la scion de la ĉina popolo pri anatomio, fiziologio, patologio, diagnozo kaj kuracado de diversaj malsanoj antaŭ pli ol du mil jaroj. Tiu riĉenhava verko metis la fundamenton de la tradicia ĉina medicino. Ĝi enhavas detalan klarigon pri akupunkturo kaj kaŭterizo, menciante naŭ diferencajn specojn de metalaj pingloj kaj multajn punktojn sur la homa korpo, kie akupunkturo kaj kaŭterizo povas esti aplikataj. La *Libro de Interna Medicino* detale priskribas la diversajn teknikojn de akupunkturo kaj kaŭterizo, klarigas pri la terapio, reguloj pri aplikado de tiuj ĉi metodoj, kaj donas konsilojn al la kuracisto. Multaj malsanoj kuracitaj per akupunkturo kaj kaŭterizo estas registritaj en historiaj libroj. Ekzemple, en 581 a.K., iu kuracisto sukcesis kuraci pacienton de komao per akupunkturo ĉe punkto sur lia verto. Tio pruvas ke la praktiko de akupunkturo havas longan historion en Ĉinio.

En 256 p.K. en Gin-dinastio, la medicinisto Huangfu Mi verkis libron titolitan *Enkonduko al Akupunkturo kaj Kaŭterizo*, en kiu li resumis ĉiujn sciojn pri akupunkturo kaj kaŭterizo akiritajn antaŭ Gin-dinastio, prezentis liston de 349 stimul-punktoj sur la homa korpo, kaj metis fundamenton por la praktiko de tiuj teknikoj.

En Tang-dinastio (618-907 p.K.), akupunkturo kaj kaŭterizo multe disvolviĝis. Kuracistoj de kaj verkoj pri tiuj ĉi medicinaj artoj estis pli multnombraj. Sistemaj lekcioj estis donataj, kaj stariĝis sistemoj de instruado kaj ekzameno.

En 1026 p.K. en la Song-dinastio, Vang Veiji, medicinisto verkis libron titolitan *Ilustrita Lernolibro pri la Stimul-punktoj por Akupunkturo kaj Kaŭterizo Montra-*

*taj sur Bronza Statuo.* Li ankaŭ faris du bronzajn figurojn por instruado, kaj markis sur ili la lokojn de ĉiuj punktoj por akupunkturo kaj kaŭterizo. Unu el la bronzaj statuoj estis perdita, kaj la alia estas nun en Japanio. Ankoraŭ unu antikva bronza statuo nun ekzistanta en Ĉinio estis farita en 1443 en Ming-dinastio. El tio oni povas vidi kiel disvolviĝintaj estas akupunkturo kaj kaŭterizo jam en tiu tempo.

Tiuj kuracmetodoj daŭre progresis en Ming-dinastio (1368-1644), kiam Jang Giĝoŭ, specialisto de akupunkturo kaj kaŭterizo, verkis *Kompleta Libro pri Akupunkturo kaj Kaŭerizo,* kiu ludis gravan rolon por pli popularigi tiujn kuracmetodojn. Tamen, ilia disvolviĝo estis malhelpitaj en la sekvanta King-dinastio (1644-1911), ĉar la feŭdaj imperiestroj konsideris ke la korpo de la imperiestra moŝto ne devas esti pikata per pingloj. Ĉe la komenco de la XX-a jarcento, la alveno de imperiismo kunportis la okcidentan medicinon al Ĉinio. Poste, dum la regado de la reakcia Kuomintango, kiam la politiko aboli la tradician ĉinan medicinon estis elmetita, la praktikado de akupunkturo kaj kaŭterizo suferis dekadencon.

En 1944 Maŭ Zedong, prezidanto de la Centra komitato de la Ĉina Komunista Partio, parolis ĉe la kunveno de kulturaj kaj edukaj laborantoj okazigita en Jen-an, el la vidpunkto de historia materiismo pri la neceso de kunlaboro inter kuracistoj de la tradicia ĉina kaj okcidenta medicino por forigi malsanojn. Deposl tiam, la teknikoj de akupunkturo kaj kaŭterizo denove reviviĝis. Multaj kuracistoj de la okcidenta medicino fariĝis lernantoj de maljunaj kuracistoj de la tradicia ĉina medicino, kaj multaj el la lastaj havantaj eminentajn teknikojn volonte transdonas siajn riĉajn spertojn. Post

la Liberiĝo, sub la brila gvidado de la partio, lernado de kuracistoj de la okcidenta medicino pri la tradicia ĉina medicino tajde disvolviĝis tra la tuta lando. Multaj kuracistoj de la okcidenta medicino aldonis akupunkturon kaj kaŭterizon al sia medicina praktikado, kaj tiam ili sukcese kuracis multe da malfacilaj malsanoj kiuj ilin embarasis antaŭe.

En 1955, samtempe kun la fondiĝo de la Akademio de Tradicia Ĉina Medicino, la Esplora Instituto de Akupunkturo kaj Kaŭterizo (antaŭe nomita Eksperimenta Instituto de Akupunkturo kaj Kaŭterizo) komencis studi la kuracadon de malsanoj per akupunkturo kaj kaŭterizo. Ili ankaŭ edukis instruistojn kaj kompilis lernolibrojn por medicinaj lernejoj kaj kolegioj. Nun en ĉiuj ĉinaj medicinaj kolegioj kaj lernejoj troviĝas jam lernoprogramoj de tiuj ĉi terapioj.

## 3. KURACADO PER AKUPUNKTURO KAJ KAŬTERIZO

La kuracado de akupunkturo kaj kaŭterizo estas bazita sur la teorio de la tradicia ĉina medicino kaj praktikata laŭ la reguloj de tiuj terapioj post kiam senerara diagnozo estas farita per tradiciaj metodoj. Tio estas tre kompleksa kaj altteknika. Ĉi tie ni povas ĝin trakti nur mallonge.

### (A) LA INTERNAJ ORGANOJ KAJ ĈEFAJ VOJOJ

Kuracistoj de la tradicia ĉina medicino dividas la enkorpan organaron en du grupojn, konatajn kiel *zang*

kaj *fu*. Estas kvin *zang*-organoj nome: la koro, hepato, lieno, pulmo kaj renoj. Estas ses *fu*-organoj nome: la stomako, grandintesto, malgrandintesto, gal-veziko, urina veziko kaj *sanĝiaŭ**. Ofte ankaŭ la perikardo estas enkalkulata formante la nombron de 12. Tiuj ĉi internaj organoj estas ĉiuj interligataj per *ĝingmaj* (ĉefaj vojoj), kiuj disvastiĝas en diversaj direktoj tra la tuta homa korpo. Ĝuste laŭ tiuj ĉi vojoj la vitala energio *(ĉi)*, sango kaj nutraĵo cirkulas kaj funkciigas la tutan homan korpon kiel organikan tuton. Ĉiu ĉefa vojo havas sian specialan nomon. Ili iras de la brusto ĝis la manoj, de la manoj ĝis la kapo, de la kapo ĝis la piedoj, kaj de la piedoj ĝis la ventro aŭ la brusto. La vitala forto en tiuj ĉi vojoj fluas senĉese tage kaj nokte. Fronte kaj dorse tra la mezo de la homa korpo ankaŭ troviĝas po speciala vojo. Do estas sume 14 tiaj ĉefaj vojoj inkluzive de ili. Ĉiuj stimul-punktoj por akupunkturo kaj kaŭterizo lokiĝas laŭlonge de tiuj vojoj; la plej granda nombro de stimul-punktoj de unu vojo estas 67, kaj la plej malgranda, 9.

### (B) LA KVAR METODOJ DE DIAGNOZO

Laŭ teorio de la tradicia ĉina medicino malsanoj estas kaŭzataj aŭ de internaj aŭ de eksteraj faktoroj. La internaj kaŭzoj estas ĝojo, kolero, maltrankvilo, penso, ĉagreno, surprizo kaj timo. La eksteraj kaŭzoj estas vento, malvarmo, seko, malseko, fajro kaj varmo. Kiam iu estas tuŝita de iu ajn el tiuj ĉi kaŭzoj, simptomoj

---

* La sanĝiaŭ konsistas el tri sekcioj, la "supra" ĉe la supra aperturo de la stomako, la "meza" interne de la stomako, kaj la "suba" ĉe la supra aperturo de la urina veziko.

aperas sur la surfaco de la korpo, interne de la 12 organoj aŭ laŭlonge de la 14 vojoj. Por diagnozi malsanojn el la simptomoj, la kuracisto de la tradicia ĉina medicino uzas kvar metodojn: rigardi, aŭskulti, demandi kaj palpi la pulson de la paciento, kaj la lasta estas la plej grava metodo. Per tiuj ĉi metodoj, la origino de la malsano estas sekvata ĝis la eksteraj partoj de la korpo, la ĉefaj vojoj, aŭ la internaj organoj implikitaj, kaj tiu ĉi diagnozo estas uzata kiel bazo por kuracado. Tiuj ĉi metodoj estas konataj de la kuracistoj de la tradicia ĉina medicino kiel la kvar metodoj de diagnozo. Ĉar tiuj ĉi metodoj estas tre kompleksaj, ili estas ne kompreneblaj sen profunda studo kaj praktika sperto.

### (C) LA STIMULPUNKTOJ POR AKUPUNKTURO KAJ KAŬTERIZO

Lokalizinte la malsanon, la kuracisto komencas akupunkturon aŭ kaŭterizon sur taŭgaj stimulpunktoj, laŭlonge de la atencitaj kaj aliaj koncernaj vojoj laŭ la teorio de la tradicia ĉina medicino. Sed ĉar estas multaj punktoj laŭlonge de ĉiu ĉefa vojo, do estas necese scii ĉe kiu el ili devas apliki la kuracilojn. La problemo estas plue komplikata de la fakto, ke uzado de akupunkturo sur unu punkto povas kuraci kelkajn specojn de malsanoj, kaj ke por kuraci unu specon de malsano oni povas bezoni la uzadon de akupunkturo sur pluraj punktoj. Tial, medicina teorio devas esti kombinita kun klinika sperto por elekti korektajn punktojn por akupunkturo kaj kaŭterizo. Sen korekta elekto de stimulpunktoj bonaj kuracefikoj ne povas esti atingitaj.

Portreto de Huangfu Mi (215-282 p.K.), Gin-dinastio kiu verkis la libron "Enkonduko al Akupunkturo kaj Kaŭterizo" en 256 p.K.

Bronza homa figuro montranta la stimulpunktojn por akupunkturo kaj kaŭterizo sur la homa korpo. Gi estas farita en Ming-dinastio (1368-1644 p.K.).

Du ilustrajoj de stimulpunktoj laŭlonge de la 14 ĉefaj vojoj, prenitaj el medicinaj traktatoj de Ming-dinastio.



La akraj pingloj uzataj en akupunkturo.



Artemizi-ruloj.

Vizaĝa paralizo antaŭ kaj post kuracado.

### (Ĉ) APLIKADO DE METODOJ LAŬ DIAGNOZO

Elektinte la stimulpunktojn, oni devas apliki metodojn taŭgajn por la malsano. En la tradicia ĉina medicino, la karaktero de diversaj malsanoj estas analizitaj tre detale. Ĉi tie ni nur menciu kaj iom klarigu unu el la ofte uzataj reguloj de akupunkturo, nome, stimulado pro malvigleco (*ŝju*), malstreĉigo pro trointenseco (*ŝi*). La malsanoj kaŭzitaj de *ŝi* laŭ la tradicia ĉina medicino povas esti klarigitaj per trofunkciado aŭ eksciteco laŭ okcidenta medicino. Malsanoj de tiu ĉi speco inkluzivas troacidecon de stomako, spasmon, doloron, ktp. Por kuraci tiun ĉi specon de malsano, akupunkturo devas esti farita tiel ke ĝi malstreĉigu la pacienton. *Ŝju* proksimiĝas al nesufiĉa funkciado, inhibicio kaj obstrukco. Malsanoj kiel nesufiĉa acideco de stomako, moviĝoparalizo, sento-paralizo ktp. apartenas al tiu ĉi speco, kaj povas esti kuracataj per stimula metodo de akupunkturo.

### (D) TEKNIKO DE PINGLO-MANIPULADO

Se la paciento sentas acidan doloreton, paralizecon, streĉon, aŭ senton kiel elektra frapo kiam la pinglo trapikas la haŭton, la rezultoj povas esti pli kontentigaj, tiam do taŭga stimula aŭ malstreĉiga metodo de akupunkturo povas esti uzata. Estas multaj manieroj por malstreĉigo aŭ stimulado per akupunkturo, sed la plej ofte uzataj estas piki per pinglo en aŭ kontraŭ la cirkuldirekto de la vitalforto. La pikado de pinglo en la direkto de la vitalcirkulado kun puŝo aŭ tordo stimulas, kaj pikado kontraŭ la cirkuldirekto kun puŝo aŭ tordo

donas malstreĉigan efikon. Prenu por ekzemplo, la vojon ĉe la flanko de la polmo, irantan de la brusto, tra la brako kaj la flanko de la polmo, ĝis la fingro-pintoj. Dum uzado de akupunkturo laŭlonge de tiu ĉi aparta vojo, se la pinglo pikas en la direkto de la fingro, la efiko estas stimula, kaj malstreĉiga, se la pinglo estas enpuŝata inversdirekte. Estas simile rilate al tordado de la pinglo. Se la pinglo estas tordata post enpuŝiĝo, en la direkto de la vojo, la efiko devas esti stimula, kaj malstreĉiga, se la pinglo estas tordata kontraŭ la direkto de la vojo. Pri la cirkulvojo de la mano al la kapo, la manipulado devas esti ĝuste inversa.

La supre priskribitaj metodoj de akupunkturo ŝajnas tre simplaj, sed en efektiva praktikado, bezonas multe da lerto kaj sperto por akiri kontentigajn rezultojn. Alivorte, la kontentiga rezulto dependas ne nur de la praveco de la metodoj de diagnozo kaj kuracado, sed ankaŭ de la akupunktura tekniko, kaj la lasta estas eĉ pli grava.

La punktoj estas diferencaj unu de alia ankaŭ en profundeco atingata de la pinglo. Kaj estas malpermesaj punktoj, tio estas, punktoj ne taŭgaj por kaj akupunkturo kaj kaŭterizo. Krome, malbona tekniko aŭ malobservo de diversaj reguloj povas rezultigi akcidentojn, kiel svenon, rompiĝon de pinglo, aŭ aliajn pli seriozajn konsekvencojn.

### (E) METODOJ DE KAŬTERIZO

La metodoj de kaŭterizo estas diversaj, sed nun la plej ofte uzata metodo estas kaŭterizi la ĝustajn punktojn per artemizi-ruloj. La decido de punktoj, diagnozo, kaj

metodoj de aplikado estas grandparte la samaj kiel tiuj de akupunkturo. En kazo de haŭta malsano, kaŭterizo povas aplikiĝi laŭ la grandeco de la kuracenda parto. Dum kaŭterizado per artemizi-ruloj, oni devas atenti ke la haŭto de la paciento ne estu brulvundita. La distanco inter la brula fino de la artemizi-rulo kaj la haŭto devas esti tia ke la paciento nur sentas komfortan varmon. Ĝenerale, la tempo por kaŭterizo ĉe ĉiu punkto devas esti de 20 ĝis 30 minutoj, sed tio povas varii laŭ cirkonstancoj.

## 4. LA EFIKECO DE AKUPUNKTURO KAJ KAŬTERIZO

Akupunkturo kaj kaŭterizo povas kuraci multajn malsanojn, kaj al certaj malsanoj ilia efikeco iam estas eĉ sufiĉe okulfrapa. Ili estas efikaj por multaj specoj da akutaj, kronikaj, nervo-funkciaj kaj parenkimaj* malsanoj, kaj dum la pasintaj kelkaj jaroj, ili estas vaste uzitaj en Ĉinio kiel terapiaj metodoj. Ili estas ne nur efikaj por nervaj, mensaj, internaj, ginekologiaj, kaj pediatriaj malsanoj, kaj ankaŭ efikaj por malsanoj de okulo, orelo, nazo, gorĝo, buŝo, kaj haŭto—eĉ por kontaĝaj malsanoj kaj tiuj kiuj ordinare bezonas ĥirurgian kuracadon. Ĉi tie ni donas ekzemplojn de la efikeco de akupunkturo kaj kaŭterizo nur pri kelkaj malsanoj.

### (A) NERVAJ KAJ MENSAJ MALSANOJ

Akupunkturo kaj kaŭterizo povas kuraci aŭ moderigi multajn specojn de nervaj malsanoj en kompare mal-

* Parenkimo: Histo formanta glandan organon.

longa tempo. Ili estas efikaj por tiaj malsanoj kiaj iskiatiko, trigemina neŭralgio, kaj diversaj specoj de neŭralgio en la kapo, brusto, lumbo, kaj membroj. La plejmulto de la pacientoj de tiuj malsanoj sentas mildiĝon de ilia doloro nelonge post kuracado. Iskiatiko estas ofte elkuracita tuj post eltiro de la pinglo. Bonaj rezultoj povas esti akiritaj ankaŭ pri obstrukcio de senta aŭ mova agado kaŭzita de malsanoj en la centra aŭ periferia nerva sistemo (escepte de kaviza kaj skleroza spinmedolito), tiaj kiaj vizaĝa paralizo, okulmova paralizo, paralizo de la radiusa kaj ulna nervoj, kaj hemiplegio** kaŭzita de cerba hemoragio. Rezultoj de la kuracado de beribero estas ankaŭ kontentigaj. Se ĝustatempa kuracado estas donita al la suferantoj de tiu ĉi malsano, plejmulto de ili povas tute resaniĝi. Strangaj sentoj, kiel doloro, malvarmo, sensento, formikiro kaj epiderma trosentemo, kaŭzitaj de reŭmatismo kaj diversaj specoj de nervoradika inflamo, povas esti kuracataj ankaŭ per akupunkturo kaj kaŭterizo kun bonaj rezultoj. La plejmulto de nervofunkciaj malsanoj, kiel histerio, diafragma spasmo, nervoza vomo, ktp.—ĉiuj povas esti elkuracitaj per akupunkturo kaj kaŭterizo. La malsanoj neŭrasteniaj kun la simptomoj de kapdoloro, kapturniĝo, sendormeco, sonĝado, orelzumado, konstipo, polucio, impotenteco, malnorma sento, ktp., povas esti rapide aŭ pograde elkuracitaj aŭ moderigataj. Akupunkturo kaj kaŭterizo povas ankaŭ ĉesigi epilepsian konvulsion, aŭ helpi pacientojn suferantajn de epilepsio pograde normaliĝi. Rilate al reakcia psikozo kaj skizofrenio, spertoj

** Paraliziĝo de duono de la korpo.

montras ke sufiĉe bonaj rezultoj povas esti akiritaj en la kuracado de ili.

### (B) MALSANOJ DE INTERNAJ ORGANOJ

Atakon de bronka astmo akupunkturo kaj kaŭterizo povas tuj ĉesigi ĉe plejmulto de pacientoj; post kelka tempo de kuracado, la seka bruado en la pulmo povas esti malgrandigita aŭ tute neniigita. Ili povas kuraci akutan stomak-enteriton en mallonga daŭro. Ili estas efikaj kontraŭ stomako-spasmo, nervorgeneza ezofag-spasmo, kaj nervoza altfrekvenca urindeziro. Ili povas faciligi pacientojn suferantajn de ulcera ventro-doloro aŭ pirozo, kaj eĉ forigi tiujn ĉi malsanojn de ili. Ankaŭ en kuraco de kelkaj specoj de kronika lakso kaj konstipo de diversaj kaŭzoj, ili povas rezultigi bonajn kuracajn efikojn. Daŭra kuracado de pacientoj de esenca altsang-premo per la metodoj de akupunkturo kaj kaŭterizo ofte rezultigas renormaliĝon. Oni scias ke ankaŭ kor-doloro estas elkuracebla per tiuj ĉi metodoj. Bonaj rezultoj estas akiritaj ankaŭ en la kuracado de altfrekvenca korbatado de nervoza karaktero kaj korbategado (inkluzive de Basedow-malsano). Multaj pacientoj de diabeto, post kuracado per akupunkturo kaj kaŭterizo, aŭ resaniĝas, aŭ trovas malpliigita la kvanton de sukero en iliaj sango kaj urino. Endemia kropo ankaŭ povas esti kuracata kun efiko, ĝin malgrandigi, aŭ tute mal-aperigi. Bonaj rezultoj ankaŭ povas esti akiritaj en kuracado de artrito, aŭ podagra aŭ reŭmatika, per akupunkturo kaj kaŭterizo. En kuraco de akuta reŭmatika artrito, la ruĝeco, svelo, kaj doloro povas esti forigitaj en kvin tagoj, kaj la sangsedimento renormaligita.

### (C) INFEKTAJ MALSANOJ

La atakoj de malario de la plejmulto de pacientoj povas esti malhelpataj, se akupunkturo estas uzata unu aŭ du horojn antaŭ ol ili okazas, kun la rezulto ke la plasmodioj iom post iom malaperas. Ĉe iuj pacientoj de tetano, akupunkturo povas ne nur tuj ĉesigi la spasmon, sed ankaŭ sanigi la pacientojn komplete en ĉirkaŭ du semajnoj, se ĝi estas aplikita sukcese.

### (Ĉ) GINEKOLOGIAJ MALSANOJ

Akupunkturo kaj kaŭterizo estas alte efikaj kontraŭ neregula malabunda, kaj dolora menstruado. Ili estas efikaj iagrade pri la simptomo de menstruhalto, vomo de gravedo, eklampsio, postakuŝa uterdoloro, kaj ne kompleta entiriĝo de utero. Paralizo de intestoj aŭ veziko post artefarita aborto povas esti elkuracita per kelkfoja apliko de akupunkturo. Oni scias ke ankaŭ kazoj de malfekundeco estas elkuraceblaj per ili.

### (D) PEDIATRIAJ MALSANOJ

Akupunkturo kaj kaŭterizo estas sufiĉe efikaj por kuraci infanajn malsanojn, kiaj nokturinado, simpla nedigesto, akuta enterito, konvulsio, ĥoreo, kaj paralizo. Multaj pacientoj de nedigesto aŭ akuta enterito resaniĝas rapide post kuracado per kaŭterizo. En iuj kazoj, sen volaj agadoj de pacientoj suferantaj de ĥoreo ĉesas post kuracado per akupunkturo por tri semajnoj. La plejmulto de kazoj de infana paralizo, se ekkuracataj en ses monatoj de ilia komenco, estas elkuraceblaj post

ĉirkaŭ kvar monatoj da kuracado per akupunkturo kaj kaŭterizo. La rezultoj de malfrua kuracado estas malpli kontentigaj, kvankam ĝi faciligas multajn pacientojn, kaj en iuj kazoj, povas eĉ elkuraci iliajn malsanojn.

### (E) MALSANOJ DE LA OKULO

Akuta konjunktivito povas esti elkuracita post unu aŭ du tagoj da kuracado. Akupunkturo povas tuj faciligi la plejmulton de tiaj pacientoj. Ĝi povas ĉesigi hemoragion de la retino, kaj redoni ĝian norman funkcion de absorbo. Same kiel atrofio de vidkapablo ĝi povas esti elkuracita post sufiĉe longa tempo de kuracado, kaj multaj pacientoj de tiu ĉi malsano reakiris vidkapablon post kuracado per akupunkturo. Kiam pacientoj de glaŭkomo* kuraciĝas per akupunkturo, ili ne nur liberiĝas de kapdoloro, sed ankaŭ akiras malaltigon de la internokula premo. Nokta blindeco povas esti elkuracita per akupunkturo kaj kaŭterizo, kaj bonaj efikoj povas esti akiritaj ankaŭ pri kolorblindeco.

### (F) MALSANOJ DE LA ORELO, NAZO, KAJ GORĜO

La kuracado per akupunkturo kaj kaŭterizo efikas bone kaj rapide pri akuta tonsilito, akuta faringito, naza hemoragio kaj nazkataro. Akupunkturo kaj kaŭterizo povas ankaŭ faciligi pacientojn de nervoza orelzumado kaj simptomaro de meniero (kapturniĝo). Ili estas efikaj pli

* glaŭkomo — speco de okulmalsano kun streĉiĝo en la okulglobo, kiu rezultigas blindiĝon.

aŭ malpli bone pri surdmuto. Post fortranĉo de la tonsilo, aŭ post operacio por kuraci naztruan inflamon, doloro estas tuj forigebla per akupunkturo.

### (G) MALSANOJ DE LA BUŜO

Akupunkturo kaj kaŭterizo estas efikaj al inflamo de la buŝo. Akupunkturo povas kuraci la salivadon de infanoj. Ĝi estas efika precipe al nervoza dentodoloro, donante tujan faciligon al 95 pocentoj de la pacientoj.

### (Ĝ) HAŬTO-MALSANOJ

Kaŭterizo produktas bonajn rezultojn kiam ĝi estas uzata por kuraci kelkajn specojn de dermito, tiaj kiaj nervogeneza dermito, akuta aŭ kronika ekzemo, akno, kaj epidermofitozo (skabio) interfingra; ankoraŭ pli bonaj rezultoj povas esti akiritaj, se ĝi estas uzata kombine kun akupunkturo. Akupunkturo estas utila por urtikario, precipe por akuta urtikario; ĝi povas ĉesigi jukadon, donis tujan faciligon al la paciento kaj elkuraci la malsanon en tre mallonga tempo.

### (H) ĤIRURGIAJ MALSANOJ

Akupunkturo kaj kaŭterizo estas efikaj al limfa tuberkulozo, kronika ulcero, mamito, anus-ellaso, kaj tendeningito. Ĝi estas utila precipe kontraŭ kapdoloro kaŭzita de etera anestezo, postoperacia intesta timpanismo* kaj

* timpanismo — streĉiĝo de la abdomeno pro akumulado de gaso en ĝi.

senurino. Tre bonaj rezultoj estas akireblaj en la kuracado de akuta apendicito per akupunkturo, tiel do multaj pacientoj tuŝitaj de tiu ĉi malsano povas liberiĝi el la sufero de ĥirurgia operacio. La pacientoj, kuracataj per tradiciaj ĉinaj drogoj kaj akupunkturo, ordinare povas resaniĝi en tri ĝis kvin tagoj.

## 5. KLARIGO PRI LA TERAPIO DE AKUPUNKTURO KAJ KAŬTERIZO

Kuracistoj de la tradicia ĉina medicino ĉiam konsideras ke la homa korpo, tuŝita de malsano, estas la batalejo de du fortoj: la povo de rezisto de la korpo kaj la kaŭzo de la malsano. La demando estas kiu el ili venkos la alian. Se la defenda povo de la organismo estas pli malforta ol la kaŭzo de la patologia kondiĉo, la funkcio, sango, interna nutraĵo, kaj la funkcio de defendo de la diversaj internaj kaj eksteraj organoj de la korpo perdos sian ekvilibron. Tiam, patologiaj kondiĉoj kiaj *ŝju* aŭ *ŝi*, malvarmo, aŭ febro rezultos. La metodoj de akupunkturo kaj kaŭterizo, kvankam variaj, estas ĉefe la sekvantaj: Se la kondiĉo de la paciento montriĝas *ŝju*, tiam la pinglo estas manipulata tiamaniere ke produktiĝas stimula efiko; se *ŝi*, la pinglo estas manipulata tiel ke ĝi produktas malstreĉan efikon; se estas malvarmeco, tiam la pinglo restas aŭ kaŭterizo estas uzata; se estas febro, oni devas rapide elpreni la pinglon tuj post kiam la paciento eksentas ĝian efikon.

Medicinaj scienculoj uzantaj modernajn metodojn ankaŭ studas la kuracadon de malsanoj per tiuj ĉi du metodoj, kaj ankoraŭ ne trovis definitivan klarigon pri ilia terapia valoro. Tamen, la ĝenerala opinio estas, ke ĉar akupun-

kturo signifas stimulon de organismo, kaj kaŭterizo signifas stimulon per varmo kaj eĉ brulo per artemizio, la kuraca efiko estas akirata pere de nerva konduko. Unuaj observadoj montras ke akupunkturo kaj kaŭterizo povas influi la videblajn elementojn de la sango, la movadon kaj sekrecion de la stomako kaj intestaro kaj la sekrecion de galo; ili stimulas la povon de sekrecio de la reno, plibonigas la kondiĉon de sangpremo kaj kor-impulso, pliigas la kvanton de imuna substanco en la korpo, kaj stimulas la funkcion de la ĉeloj en ekstermado de malsanaj elementoj. Ĉiuj tiuj ĉi efikoj estas proksime rilataj al la elektitaj punktoj por akupunkturo kaj la tekniko de akupunktura manipulado. Ĝis nun ni scias, ke akupunkturo kaj kaŭterizo povas produkti kuracajn efikojn al la centra nervo-sistemo, segmenta reflekso, sango, kaj korpopartoj. Kaj ĉiuj tiuj efikoj estas interrilatantaj, sed el ili la ĉefa estas la nerva funkcio. Ampleksaj esploradoj pri diversaj flankoj de tiuj ĉi tradiciaj terapioj estas entreprenataj de ĉinaj medicinaj laborantoj surbaze de sciencaj eksperimentoj. Iliaj laboroj certe pli bone klarigos la efikon de la praktikado.